

## INDICE

- I nostri prossimi venerdì
- Cattedra di Milano d'esperanto: esami e corsi
- Si ritorna in Via Dante con il gazebo
- Universala Kongreso en Hanojo: malgranda sed granda
- Risoluzione del congresso mondiale di Hanoi
- Raporto pri la 79a Esperanto-Kongreso en Italujo
- Mia partopreno en la kongreso de Mazara
- Premio Deguçi al Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia
- L'esperanto compie 125 anni
- Elektita la nova estraro okaze de la ILEI Konferenco
- Vatikana Radio nun podkaste
- Un articolo speciale su una rivista specialistica
- Estrarkunsido
- Niaj pasintaj vendredoj
- Notizie dal mondo

### **Circolo Esperantista Milanese**

Via De Predis 9 - 20155 Milano - tel. 347-4262214 *(solo venerdì sera)*

*e-mail:* [esperantomi@infinito.it](mailto:esperantomi@infinito.it)

*rete:* <http://milano.esperantoitalia.it/>

*C.C.P.* 26448209

## **I NOSTRI PROSSIMI VENERDÌ**

**ore 21,15**

*aperti a tutti gli interessati: soci e non soci*

### **Venerdì 14 settembre**

la sede riapre con la bimestrale ed aperta a tutti

#### **RIUNIONE DEL CONSIGLIO DIRETTIVO**

### **Venerdì 21 settembre**

Dopo la pausa si ritorna alla piacevole tradizione di ritrovarsi in pizzeria (stavolta da "Ciccibello" in Via degli Ailanti n° 3.

Prenotarsi in sede o presso Rodari, telef. 02 2364190) per poi ascoltare in sede, a cura di alcuni partecipanti, i

#### **RAPPORTI SUI PRINCIPALI CONGRESSI ESTIVI**

### **Venerdì 28 settembre**

Post longtempa malapero, finfine revenas la

#### **LINGVA RONDO**

### **Venerdì 5 ottobre**

#### **TRAFOLIUMANTE LA ESPERANTISTAN GAZETARON**

### **Venerdì 12 ottobre**

#### **MOZAIKO**

### **Venerdì 19 ottobre**

Un conviviale incontro in pizzeria (presso "Il Faraone" - via Masolino da Panicale 13 con le solite modalità) farà da prologo al programma curato dal s-ano Ermigi Rodari che, nel decimo anniversario della sua morte, ricorderà

#### **GIORDANO AZZI**

esemplare figura di uomo, cittadino, esperantista e dirigente.

### **Venerdì 26 ottobre**

nova etapo de la

#### **LINGVA RONDO**

### **Venerdì 2 novembre**

#### **KONVERSACIA RONDO**

### **Venerdì 9 novembre**

È aperta a tutti come sempre la

#### **RIUNIONE DEL CONSIGLIO DIRETTIVO**

### **Venerdì 16 novembre**

Programma in sede da definire, preceduto probabilmente da un incontro in pizzeria.

### **GLI "INCONTRI DI CONVERSAZIONE"**

del mercoledì in sede, riprendono il 19 settembre sempre dalle ore 17 alle 19.

### **CATTEDRA DI MILANO D'ESPERANTO: ESAMI E CORSI**

#### **Sessione di esami**

Come già preannunciato la Cattedra di Milano organizza una sessione autunnale di esami di 1° e 2° grado, che avrà luogo il giorno 13 ottobre, sabato, presso la sede del Circolo Esperantista Milanese in via De Predis 9, angolo via Bramantino con inizio alle ore 9.00. Essa è aperta a tutti gli interessati, milanesi e no, nel rispetto del regolamento dell'Istituto Italiano d'Esperanto.

Gli interessati sono pregati di comunicare la loro partecipazione al responsabile, dott. Giovanni Daminelli:

tel. 02 2621149

cellulare 347 9791890

[giovanni.daminelli@teletu.it](mailto:giovanni.daminelli@teletu.it)

#### **Corsi di Esperanto**

Anche quest'anno il Circolo organizza corsi di Esperanto di diverso grado, presso la sua sede. A secondo delle richieste, essi saranno preserali e serali, al martedì o al mercoledì, di circa due ore una volta alla settimana, da metà ottobre a maggio 2013.

La quota della iscrizione al corso è sempre di € 50, comprensiva dei libri di testo.

Il Circolo è disponibile anche a curare corsi in altre sedi, con un minimo di iscritti.

Gli interessati sono pregati di preannunciare la loro iscrizione al responsabile dott. Daminelli, sopra già citato.

## **SI RITORNA IN VIA DANTE CON IL GAZEBO**

Salvo abbastanza improbabili intoppi burocratici, sabato 6 ottobre, data che anche coincide con l'iniziativa esperantista internazionale dell'Ago Tago, il nostro Circolo ritornerà in via Dante con il gazebo per una giornata informativa dedicata al pubblico. Il programma si svolgerà come al solito e quindi non occorre ripetersi. È invece il caso di ricordare che l'iniziativa è rivolta ai non esperantisti ma si avvale di questi per realizzarla e quanto più numerosi essi sono e tanto più si favorisce un buon risultato.

## **UNIVERSALA KONGRESO EN HANOJO: MALGRANDA SED GRANDA**

La ĉi-jara 97a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Hanojo, Vjetnamujo, de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto. Laŭnombre ĝi estis malgranda kun malpli ol 1000 partoprenantoj, sed samtempe ĝi estis granda. Kial? Mi provas doni kelkajn respondojn.

Ĉeestis multaj azianoj el multaj aziaj landoj. Ĉi tiuj ĉeestantaj azianoj estis junaj kaj entuziasmaj. Oni esence havis alian homan pejzaĝon rilate al la kongresoj en Eŭropo. Mi havis la impreson, ke tio montras la estontajn okazaĵojn, alivorte la transprenon de la torĉo fare de la aziaj esperantistoj. Kio estas ankaŭ io natura, se oni konsideras la impetan evoluon de Azio sur ĉiuj aliaj kampoj de la homa evoluo.

Kompreneble, kiel ĉiam okazas en landoj ankoraŭ ligitaj al propra komunisma pasinteco, oni fizike vidis la plenan subtenon de la registaro. Kion diri, ekzemple, pri la centoj da frapaj afiŝoj en la vjetnama kaj en Esperanto, kiuj bonvenigis la kongreso en ĉiuj ĉefaj stratoj de la urbo. Por doni italan ekvivalenton, kiam okazis la UK en Florenco, la vojo inter la flughaveno kaj la urbo devis esti plena je dulingvaj bonven-banderoloj kaj en la ĉefaj stratoj de Florenco devis esti cento da tiaj banderoloj kaj same la fasado de la katedralo. Kompreneble la loka amaskomunikiloj estis daŭre je dispono de la UK por dissendi filmojn kaj intervjuojn. Ion similan en Florenco estus povinta fari RAI per sendado de teamo de ĵurnalistoj, kiuj restus unu semajnon tie.

Pri la enhavo de la kongreslaboroj nenio aparta estas dirinda. Ili estis la kutimaj jam konataj eroj: kunsido de la Komitato, kunsido

de la Akademio, kunsido de la fakaj asocioj, Internacia Kongresa Universitato, solenaj malfermo kaj fermo, kongresa rezolucio. Mi citas parton de tiu rezolucio por doni ideon pri la diskutoj rilate al la kongresa temo “Esperanto: ponto al paco, amikeco kaj disvolviĝo”.

### **125-jara, Esperanto konstruas pontojn al pli justa kaj paca mondo**

- “Kunveninte... [ni] rekonfirmas la gravecon de lingvo konstruita sur la idealoj de paco, amikeco, kaj reciproka respekto.

- Por homoj el ĉiuj landoj kaj vivofonoj, Esperanto proponas praktikan kaj potencon rimedon por rekta kontakto, reciproka interkonatiĝo kaj profunda amikiĝo.

- Por mondo kie ankoraŭ abundas konfliktoj kaj maljustaĵoj, Esperanto proponas kulturon de paco, kiun kunkonstruas en egaleca etoso homoj el ĉiuj kontinentoj...

- 125 jarojn post sia apero, Esperanto estas ĉiam pli vaste uzata kiel ponto al amikeco, paco, kaj disvolviĝo – evoluo akcelata per la disvastiĝo de alia tutmonda komunikilo, Interreto. Tion oni vidas interalie per la ĉi-jara aldono de Esperanto kiel 64a lingvo en la ret-tradukilo de Google.”

Ĉi tiu rezolucio pravas, ke la okcidentanoj, kiuj verkis ĝin ne komprenis la esencon de la kongresa temo proponita de vjetnamoj, kiu ne aludis al individuaj amikecoj sed al amikeco kaj interhelpo inter popoloj kaj registaroj.

La aziecon de la kongreso pravas ankaŭ la apartaj aranĝoj, Tago de Vjetnamujo, Tago de Ĉinujo, programeroj de Oomoto, dancoj de la nepalanoj kaj indonezianoj, ktp.

Oni vidis kiel Esperanto efektive vivas en Azio. Jen ekzemplon: Oomoto starigis centron en Mongolujo kun nomo en Esperanto, kiu helpas ĉiujn lernantojn en tiu malriĉa lando ricevi skribilojn kaj kajerojn. Mi donu plian ekzemplon: esperantistoj en Indonezio fariĝis tiom multaj, ke ili venis dekoje al la kongreso kaj intencas aranĝi sian unuan landan kongreson venontjare.

Fine, sed ne fone, iom da politiko. En sia malferma parolado Probal Dasgupta diris (en la ĉeesto de la vjetnama vic-ŝtatprezidentino), ke la subteno al Vjetnamujo dum la milito kontraŭ Usono igis la esperantistojn konscii pri sia rolo kiel mondoplibonigantoj. Kelkaj kritikis tion, ĉar ĝi estus malneŭtrala agnosko de la maldekstrismaj

elementoj en UEA, sed aliflanke tio estas la vero, kaj, kiel diras la kanto “la internacio”, “la vero tondras en kratero”.

Vidante la nunajn vjetnamojn, kies vivkondiĉoj estas ankoraŭ “spartaj” (se oni uzas plibeligan esprimon), oni ne povas ne rebedaŭri pri la tiama milito.

Hanojo estas urbo moderna en sia azieco. Tio, kio trafas onin, estas la granda amaso da motorbicikloj, kiuj konsistigas riveron tra la urbaj stratoj, kiu apenaŭ haltas pro la trafiklampaj indikoj.

Esperable neniam ili transformiĝos al aŭtomobiloj, ĉar tiam la malpurigo de la medio detruos la urbon.

*Renato Corsetti*

### **RISOLUZIONE DEL CONGRESSO MONDIALE DI HANOI**

L’esperanto, da 125 anni, costruisce ponti verso un mondo più giusto e più pacifico.

Riunendosi ad Hanoi, Vietnam, dal 28 luglio al 4 agosto 2012, più di 800 partecipanti al 97° Congresso Mondiale di Esperanto riaffermano l’importanza di una lingua costruita sugli ideali di pace, amicizia e rispetto reciproco.

Per uomini di tutti i paesi e di tutti i sistemi di vita, l’esperanto offre uno strumento pratico ed efficace per contatti diretti, conoscenza reciproca e amicizia profonda.

Per un mondo dove sono ancora molti i conflitti e le ingiustizie, l’esperanto propone una cultura di pace, costruita da persone di tutti i continenti su un piede di parità.

Per una comunità internazionale che si sforza di realizzare gli Obiettivi di Sviluppo del Millennio delle Nazioni Unite, l’esperanto propone una via per completare l’evoluzione verso un partenariato mondiale a cui collaborano non solo stati con stati, ma uomini con uomini.

125 anni dopo la sua uscita, l’esperanto è usato sempre più largamente come ponte verso l’amicizia, la pace e lo sviluppo – evoluzione accelerata tramite la diffusione di un altro mezzo di comunicazione globale, internet.

Lo si vede, tra l’altro, dall’aggiunta, quest’anno, dell’esperanto come sessantaquattresima lingua nel sistema di traduzione in rete di Google.

Invitiamo le persone di tutti i paesi ad utilizzare e a costruire insieme quel ponte, che tende ad un mondo più giusto e pacifico, dove fioriscano tutte le lingue e tutte le culture.

### **RAPORTO PRI LA 79a ESPERANTO-KONGRESO N ITALUJO**

Ĉijare la kongreso de la Itala Esperanto Federacio estis vere internacia kaj grandioza. Aliĝis 340 personoj alvenintaj de la kvin kontinentoj. El ili nur 115 estis Italoj; la eksterlandanoj plej multenombraj estis la Poloj (34), poste estis la Francoj (24), la Rusoj (23), Ukrainoj (14), Belgoj kaj Germanoj (23), Hispanoj (20) kaj aliaj. Komprenoble, ne ĉiuj povis partopreni: ekzemple la 19 afrikaj aliĝintoj ne povis akiri la necesan vizon; pro tio ili ne venis. Temo de la kongreso estis: “Sed homoj kun homoj: la pluretna intuicio de Zamenhof”.

Nia kongresejo estis hotelo “Hopps”, ĉe la marbordo, bela, komforta, kun multenombraj ejoj kaj salonoj por nia kunvenoj, naĝejo kaj bona manĝaĵo.

La urbo jam de longe sin preparis akcepti kaj gastigi nin. En Torino dum la pasinta kongreso la urbestro de Mazara Nicolò Cristaldi, prezentis sian urbon kaj invitis nin; en Januaro oni estigis “Centro-n pri Esperanto kaj interkulturo” por kunordigi la evento; pli ol 500 lernantoj el sep mazaraj lernejoj sekvis esperanto-kursojn, kiuj daŭros la venontan jaron; dum nia kongreso, en la urbocentro estis lokitaj multenombraj afiŝoj kun la programo de niaj enurbaj prezentadoj, kaj tolostrioj tra la stratoj anoncis nian ĉeeston.

Sabaton, je la 19, en la katedralo, la paroĥestro, celebris meson en Esperanto multenombre partoprenitan, kaj vespere post la vespermanĝo Jomo muzikis en la ĉefa placo ĝis noktomezo kun granda partopreno de publiko.

Dimanĉon je la 10 en la salono de la komunuma konsilio okazis la solena malfermo de la kongreso je la ĉeesto de la urbestro, kie substrekis la pluretnan vokiĝon de Mazara, urbo en kiu oni parolas pli ol kvardek malsamajn lingvojn. Antaŭ la urbestro longe parolis pri interkulturo Khaled Fouad Allam profesoro pri sociologio de la muzulmana mondo kaj historio de la islamaj landoj ĉe la Triesta Universitato kaj konsilanto pri mediteraneaj politikoj ĉe la Mazara komunumo. La festoparoladon plenumis Barbara Pietrzak, pola kaj

ĝenerala sekretariino de UEA. Ŝi prelegis pri la temo de la kongreso kun aparta rimarko al la penso, agado kaj sento de Zamenhof.

Sekvis la kutimaj salutoj fare de la reprezentantoj de la diversaj landoj kaj fakaj asocioj. Fine oni anoncis la venontan kongreson okazontan de la 3-a ĝis la 8-a de Aŭgusto en Kastelaro (apud Sanremo). Post la legado de la salutoj senditaj de la urbestro de Kastelaro, oni finis per la kantado de himno "La Espero".

Postagmeze okazis la deviga Jar-sembleo de IEF kun la kutimaj debatoj. Malmultnombraj la ĉeestantoj kaj la voĉdonantoj, ankaŭ pro kelkaj misfunkcioj. La morala kaj la financa raportoj estis majoritate aprobitaj. Nia s-ano Gianni Conti, fronte al la konstato, ke la nombro de la asociitoj malpliiĝas, malgraŭ la multenombro de la ret-kursanoj, proponis doni unujaran senpagan aliĝon al partoprenantoj la retajn kursojn kun la espero ke ili renovigu la aliĝon en la postaj jaroj.

Vespere sur la ĉefa placo okazis koncerto de la de la esperantista duopo "Kajto" ankaŭ ĉifoje kun bona partoprenado de publiko.

Dum la tuta semajno sinsekvis intensa aktivado kun prelegoj, kursoj pri la lingvo, koncertoj, teatraĵoj, kunvenoj. Aparte riĉa estis la elekteleco de la ekskursoj en la tuta okcidenta Sicilio. Aparte kurioza estis la vizito al la urbo de Mazara kaj ĝia kasbo ĉar gvidata de la urbestro mem. La partoprenantoj en unu el la biciklaj ekskursoj havis je sia dispono la biciklon dum la tuta semajno.

Sabaton matene je la deka okazis la oficiala fermo sed la plejmulto jam devis foriri antaŭe.

*Giovanni Daminelli*

## **MIA PARTOPRENO EN LA KONGRESO DE MAZARA**

De la 18a ĝis la 25a de aŭgusto 2012 okazis la 79a Itala Kongreso de Esperanto. Tiun ĉi jaron oni renkontiĝis en la sicilia urbo Mazara del Vallo. Dank'al la intereso de la urbestro Nicolò Cristaldi, jam dum la tuta jaro estis aranĝitaj ekspozicioj, lernejoj kaj aliaj iniciativoj por Esperanto, kiu ankaŭ ricevis sidejon en la urba Interkultura Centro. Dum la kongreso oni eĉ dediĉis al Esperanto urbocentran vojeto.

Tiun ĉi jaron mi ne partoprenis kursojn aŭ prelegojn sed mi precipe ekskursis, ĉar antaŭe mi neniam estis en Sicilio. Mi ege

amuziĝis vizitante belajn urbojn kiel Agrigento, Palermo, Monreale, Piana degli Albanesi kaj Trapani. Vespere estis aranĝita interesa programo kun koncertoj en bela placo en Mazara, dum en la kongresejo oni tre volonte renkontiĝis por la internacia vespero kaj por bongustegaj trinkomanĝvesperoj (kaj je la internacia kaj je la sicilia stilo!). La ĉemara sidejo de la kongreso altiris sufiĉe grandan grupon da junuloj, dum en la hotelo oni havis belan grandan naĝejon. Kaj kompreneble ankaŭ la bongustaj siciliaj manĝaĵoj de la hotelo ege kontribuis al la sukceso de la kongreso!

Kiel kutime, dum la semajno ankaŭ okazis assembleoj de E-istaj organizoj. Mi partoprenis tiun de Itala Esperanto Federacio, kvankam mi ne ĉeestis la lastajn du trionojn de la assembleo ĉar mi volontulis kiel skrutinianto en alia ĉambro dum la voĉdonado por la aprobo de morala raporto kaj financa bilanco.

Mi tre volonte rimarkigas, ke dum eksterordinara assembleo de Itala Esperantista Junularo nia samklubano Pierre Caliaro iĝis nova Prezidanto de IEJ. Al li gratulojn kaj bonegan laboron!

Mi vere tre ŝatis tiun ĉi kongreson en Mazara. Kvankam mi ne partoprenis kursojn aŭ prelegojn, mi ege malstreĉiĝis kaj amuziĝis parolante la internacian lingvon dum la tuta semajno kaj renkontiĝante kun samideanoj el malsamaj landoj. Do ĝis la revido al ĉiuj en la venontjara Kongreso en Kastelaro de Sanremo!

*Claudio Doriget*

## **PREMIO DEGUĈI AL URSULA KAJ GIUSEPPE GRATTAPAGLIA**

Ges-roj Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia ricevis la ĉi-jaran Premion Onisaburo Deguĉi. La Estraro de UEA aljuĝas tiun "esperantistan pacpremion" pro agado, kiu per Esperanto antaŭenigis internacian amikecon kaj solidarecon en la spirito de D-ro L.L. Zamenhof kaj Onisaburo Deguĉi. La Premio estis starigita en 1987 per donaco de Oomoto; ĝi konsistas el diplomo, monsumo de 2000 eŭroj kaj donaceto de Oomoto.

Ges-roj Grattapaglia laboras ekde 1974 volontule en Brazilo en la bieno-lernejo Bona Espero, esperantista eduka institucio por infanoj en socia risko. De multaj jaroj ili agas en la internacia Rotaria movado favore al Esperanto. Ili aktive kontribuis por la videbligo de Esperanto en Rio+20, la konferenco de UN pri

daŭripova evoluo, kiu okazis en Rio-de-Ĵanejro en junio ĉi-jare, 20 jarojn post la unua tia konferenco en 1992, en kiu ili ankaŭ aktive partoprenis.

La decido pri la premio estis anoncita en la Solena Fermo de la 97-a UK en Hanojo. Ĉar ges-roj Grattapaglia ne povis veni al tiu UK, la Premio estos transdonita al ili en la Itala Esperanto-Kongreso, okazonta de la 18-a ĝis la 25-a de aŭgusto en Mazaradelvalo.

*(El Komunikoj de UEA)*

## **L'ESPERANTO COMPIE 125 ANNI**

Il 26 luglio 2012 l'Esperanto compie 125 anni. Nello stesso giorno del 1887, infatti, il polacco Ludovico Zamenhof presentava al mondo la sua lingua con l'Unua libro ("Primo libro"), una grammatica accompagnata da un breve saggio introduttivo ed alcuni testi di prosa e poesia, originali e tradotti.

L'esperanto ha un tratto estremamente particolare, l'interna ideo. La lingua, infatti, è nata e si è sviluppata per offrire "un fondamento neutrale sul quale i diversi gruppi umani possano pacificamente e fraternamente mettersi in comunicazione". L'esperanto, come ha scritto Umberto Eco, "non pretende né di essere la lingua perfetta né di volersi sovrapporre alle lingue esistenti".

Nel 1905 Zamenhof – premiato con la "Legione d'Onore" dal Ministro francese della Pubblica Istruzione – ha fissato i principi fondamentali nel "Fundamento de esperanto". La lingua da subito destò l'interesse di studiosi ed appassionati, tra i quali lo scrittore Jules Verne, presidente onorario del gruppo esperantista d'Amiens, che intraprese la stesura di un libro - rimasto incompiuto a causa della sua improvvisa morte - *Voyage d'étude*, in cui il romanziere francese definiva l'esperanto come "il più sicuro, il più valido veicolo della civilizzazione".

Il movimento esperantista, duramente perseguitato sia dal nazismo che dal comunismo, è tornato ad organizzarsi con più efficacia, ottenendo importanti riconoscimenti a livello internazionale quali le risoluzioni Unesco di Montevideo (1954) e Sofia (1985).

125 anni dopo dalla pubblicazione dell'Unua Libro, l'esperanto oggi è una lingua usata in tutto il mondo e ricca di forza

espressiva. Gli autori di riferimento della letteratura esperantista, per citarne alcuni, sono francesi (Waringhien), ungheresi (Baghy, Kalocsay), scozzesi (Auld). Un'altra particolarità dell'esperanto: tanti scrittori provenienti da diverse parti del mondo e da diverse culture hanno creato una letteratura che si caratterizza per varietà di temi, di storie, di stili. L'esperanto è multiculturale, semplice ed efficace, e contribuisce a una comunicazione equa e a un multilinguismo sostenibile.

*La Federazione Esperantista Italiana*

## **ELEKTITA LA NOVA ESTRARO OKAZE DE LA ILEI KONFERENCO**

Elektoj okazis en Kunmingo en la 24a de julio, 2012, kun 30 validaj komitatanaj voĉoj. Post fermo de proponoj, estis naŭ kandidatoj. La komitato decidis per voĉdono, ke la estraro konsistu el naŭ personoj, el kiuj tri estas elektitaj por specifaj oficoj.

Jen la nova estraro:

*Prezidanto:* s-ro Stefan MacGill, Hungario/Nov-Zelando

*Sekretario:* s-ro Radojica Petrović, Serbio

*Estrarano pri financoj:* s-ro Bill Harris, Usono

*Pliaj estraranoj* (taskdivido anoncota): s-ino Gong Xiaofeng (Arko), Ĉinio, s-ro Bharat Ghimire, Nepalo, s-ino Magdalena Feifičova (Fejfi), Slovakio, s-ino Enikő Zengő Sereghy, Hungario, s-ino Penny Vos, Aŭstralio, s-ino Zsófia Kóródy, Germanio/Hungario.

Fine de la kunsido, la prezidanto kaj la komitato kore dankis al la malnova estraro pro la farita laboro, ili dankis la elektokomisionon pro la modele gvidita elekto-procezo, kaj la komitato bondeziris al la nova teamo.

*Stefan MacGill - Prezidanto (reelektita) de ILEI*

## **VATIKANA RADIO NUN PODKASTE**

Bedaŭrinde ankaŭ la elsendoj en esperanto de ĉi tiu radio pere de mezaj kaj kurtaj ondoj malaperas. Iom post iom, tiu ĉi estas la sorto de ĉiuj traeteraj dissendoj al eksterlando precipe ĉar la intereso pri ili malaltiĝas kaj tio ne plu pravigas la elspezon. Paŝo post paŝo televido forrabas aŭskultantojn, kaj spacon, al la iama reĝino.

Nun la esperantaj elsendoj okazas nur podkaste per interreto kaj iliaj programoj, samkiel ĉiuj aliaj, estas akurate enkalkulataj en la

statistiko por kontroli ĉu ili havas sufiĉe da aŭskultantoj, ĉu la indico de ŝato estas alta aŭ ne. Do, la estonta pluvivo de tiaj elsendoj dependos de la nombro de aŭskultantoj.

Se oni deziras ke la esperantaj dissendoj daŭru, evitante senutilajn bedaŭrojn poste, ĉiuj estas petataj alklaki la ligilon al la podkastaj elsendoj de Vatkana Radio. Ĉiun merkredon, jaŭdon kaj dimanĉon oni povos trovi la lastan programon klakante en:

[http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/on\\_demand.asp](http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/on_demand.asp)

Tiel oni evitos la morton de esperanta voĉo, oni helpos tre taŭgan esperantistan agadon kaj oni donos merititan gratifikon al la volontuloj kiuj sindoneme prizorgas ĉi tiun pezan laboron nur por subteni la internacian lingvon.

### **UN ARTICOLO SPECIALE SU UNA RIVISTA SPECIALISTICA**

Il n.º 160 di gennaio-aprile di "Scrittura" pubblica un esauriente e ben coordinato articolo dedicato all'Esperanto titolato "Un viaggio per il mondo che dura da 125 anni", la cui autrice è la nota s-anino milanese Alga Guernieri. Rivista, edita dall'Istituto internazionale Girolamo Moretti, molto apprezzata nel settore della grafologia.

L'articolo, in una decina di pagine della rivista, fornisce una molto documentata panoramica sull'Esperanto e su Zamenhof, la storia e le finalità. Ovviamente non poteva mancare un accurato esame in chiave grafologica del suo creatore.

Un'opera che ha richiesto impegno e specifica competenza.

### **ESTRARKUNSIDO**

Vendrede la 6an de julio okazis la kutima estrarkunsido. Ĉefe oni pritraktis la temon de la aŭtunaj kursoj, konstatante kun bedaŭro ke nia s-ano Gianni Conti rezignas aranĝi kursojn ĉe Universitatoj de Tria Aĝo en urbetoj apud Milano. S-ano Daminelli tamen estas ĉiam disponebla por tiu de Milano, se tie estos interesiĝantoj, kiuj en la lastaj du jaroj mankis. Ĉe nia sidejo li estros kiel kutime la 1an kaj la 2an gradajn kursojn. Eble okazos aŭtuna ekzamen-sesio: estas almenaŭ du kandidatoj.

La problemo estas kiel altiri interesiĝantojn al la kursoj. Disdonado de flugfolioj ne donis favorajn rezultojn. Oni konstatis ke la gazebo surstrate, aŭ similaj iniciatoj, estas tre utilaj kiel informiloj sed ne por

tiu ĉi celo, samkiel la komunikaĵoj por la gazetaro. Laŭ la spertoj de la torinaj s-anoj, ŝajnas ke interesiĝon vekas partopreno en la tiel nomitaj "lingvaj aperitivoj". S-ano Doriget konas lokojn kie la milanaj diverslingvaj junuloj same kutimas renkontiĝi por trinki ion kaj babili. Septembre li kun s-ano Daminelli kaj kelka kroma junulo starigos areton kiu elprovos ĉi tiun vojon. Krome oni stimulos la junulojn utiligi la specifajn afiŝetojn kiujn ili eldonigis por ilin pendigi ĉe universitatoj kaj altlernejoj. La prezidanto kaj la sekretario kontrolos ĉu estas eblecoj ĉe la komunuma Plur-etna Centro en kvartalo Missaglia, sed oni dubas ke ĝiaj celoj estu nur assistaj kaj deĵoraj.

Pri la estonta gazebo, programita kiel kutime en strato Dante, de la 6a de oktobro, koincide kun la Ago-Tago, nia prezidanto Polerani konfirmis ke jam estis plenumita la burokrata itinero, laŭ la novaj reguloj enkondukitaj de la nova komunuma estraro. Nun oni devas atendi la rezultojn.

La sekretario informis ke jam estas presitaj kaj disponeblaj, krom 3000 ĉefpaĝoj por Informilano, tri informiloj necesaj, flanke de tiuj pretigitaj de FEI, por kompletigi la surlokan propagandon. Sume ili estas 12.000 flugfolioj kaj estas la kerno de projekto pri informado prezentita al FEI. Li ankaŭ konfirmis ke, laŭ la decidoj de la antaŭa estrarkunsido, jam oni kompletigis la konvertadon de niaj ŝparoj de protektata fonduso al poŝtaj fruktodonaj biloj garantiitaj kontraŭ la inflacio. Fine oni informis ke oni favore respondis al komunuma enketo pri la interesiĝo de asocioj, k.t.p. meti proprajn informilojn senpage ĉe stacioj de subteraj fervojoj, kvartalaj bazarhaloj, k.t.p. Ni estos atentaj pri la sekvoj, dum oni donis al d-ro Daminelli la taskon esti la referenculo de la Klubo pri tiu ĉi temo.

*E. R.*

### **NIAJ PASINTAJ VENDREDOJ**

La lasta vespera programo antaŭ la someraj libertempoj okazis la 13an de julio kun du samtempaj ĝojigaj eventoj. La unua estis la reveno al nia sidejo de nia s-ano inĝ. Gustavo Bonvecchiato post proksimume dek monatoj da malĉeesto, pro la grava akcidento je la femuro: longa aplaŭdo festis lin kaj lian naskiĝan datrevenon, post unu tago, La dua estis la partopreno de s-ano Edoardo Berdor, juna estrarano de la hispana esperanta federacio, nuntempe en Italio pro turismaj kialoj.

Li aranĝis ankaŭ mallongan intervenon por sin prezenti kaj saluti.

La programon prizorgis nia s-ano Gianni Conti, kies kabareta fantazio ĉijare pritraktis la proverbojn, kiel anoncis la titolo mem: "De kiu proverbo vi estas?" Li ekis memorigante ke ili estas gravaj kaj influaj en la prahistorio de Esperanto, ĉar la patro de Zamenhof estis pasia kolektanto de proverboj kaj la filo tradukis ilin por lin konvinki. Krome li aludis al la "Arbo de la proverboj", unu el siaj kreaĵoj en la konata Ĝardeno Esperanto en Cormanò. Poste li amuziĝis ludante per la proverboj, aŭ ilin sprite modifante aŭ renversante, aŭ provo ke korektante. La proverboj estas gravaj helpiloj laŭlonge la homa vivo, samkiel orientigiloj. Se eventuale oni perdas la orientiĝon... nia Gianni Conti savas ĉiujn ĉeestantojn donacante al ili belan kaj funkciantan magnetan kompason!

## NOTIZIE DAL MONDO

**Bologna** – La celebrazio del centenario del Grupo, rimandata a causa del terremoto, avrÀ luoĝo il 26-27-28 oktobro. Il programo, da definire, ricalĉerÀ quello originale: mostra al venerdì, la parte ufficiale al sabato, e il 26 ĝita a Riolutato ricevuti dal sindaco.

Informazioni ed adesioni; amadeimario@iperbole.bologna.it

**Cambrils (Tarragona-Spagna)** – Questa la sede della 20ª edizione della nota Internacia Esperanta Semajno de Kulturo kaj Turismo, che si svolĝerÀ dal 6 al 13 oktobro 2012, Tra i conferenziari anche la Segretaria Generale dekl'UEA Barbara Pietrzak.

**Tokio** – Il celebre libro "La origino de Specioj" di Darwin, tradotto in esperanto da Klivo Lendon, è ora anche disponibile sul sito <http://www.012.upp.sonet.ne.jp/klivo/origino/index.html>

**Gresillon** – La famosa Esperanto-Kulturdomo ha festeggiato questa estate i 60 anni di attività esperantista in questo castello.

**Vienna** – Circa diecimila sono stati nel 2011 i visitatori del museo dell'Esperanto, presso la Biblioteca Nazionale austriaca, diretto da Herbert Mayer.

**Milano** – Dopo aver firmato in trecento la lettera di protesta contro la decisione del rettore Azzone di adottare l'inglese in alcuni corsi del Politecnico, un centinaio di docenti hanno pure fatto ricorso al TAR, perché la scelta sarebbe anticostituzionale, contraria alle leggi vigenti, coercitiva e dannosa verso gli studenti stessi.

**Trieste** – La quinta edizione del "Forum Mondiale dei Giovani – Diritto di Dialogo" si terrÀ dal 21 al 23 settembre. Come sempre gli

esperantisti sono molto graditi. Ognuno legge un intervento su un tema scelto fra quelli proposti, ispirati al tema della cittadinanza.

Informazioni, ecc. su [www.castellodiduinoepoesia.org](http://www.castellodiduinoepoesia.org)

**Rotterdam** – La Fondazione Antoni Grabowsky ha premiato questo anno l'eclettico olandese Gerrit Berveling per le attività di scrittore e nel movimento esperantista. Secondo premio alla associazione culturale esperantista polacca Arkones, che realizza molti concerti e spettacoli teatrali, conferenze, dibattiti e gruppi di lavoro, ecc.

**Mazara del Vallo** – Il sito del Comune dal 26 luglio pubblica una scheda al giorno su temi esperantisti di lingua, cultura, ecc. Su <http://www.comune.mazaradelvallo.tp.it>: dalla pagina iniziale scegliere "portale informazioni" e poi "Esperanto 125". Infatti l'iniziativa durerÀ 125 giorni in omaggio al giubileo.

**Capannori (Lucca)** – A partire dal prossimo anno scolastico (2012/13) il liceo di Capannori parteciperÀ ad un progetto europeo di collaborazione con altre scuole di Bulgaria, Romania, Germania, Lituania e Svezia (programma Comenius). Importante in questo progetto è l'uso dell'esperanto come lingua di comunicazione. Ai primi giorni di settembre 2012, previsto un corso di esperanto di circa 20-30 ore per alcuni insegnanti della scuola.

**Castello di Gresillon (Francia)** – Una particolare settimana di ferie per famiglie, ragazzi e nonni verrÀ organizzata dal 27 ottobre al 3 novembre: corsi differenziati e varie attività culturali e ricreative  
Dettagli in <http://gresillon.org/autune>

**Cracovia** – È deceduta Jadwiga Gibczynska, attiva esperantista in parecchi campi, ma specialmente attrice. Ha recitato in numerosi spettacoli e congressi universali.

**Dortmund** – Qui si svolĝerÀ la 29ª edizione di "Internacia Festivalo" il tradizionale incontro di fine anno (dal 27 dicembre al 3 gennaio).

Vario il programma culturale e ricreativo. Il tema conduttore sarÀ "Komputero kaj Interreto": [www.internacia-festivalo.de](http://www.internacia-festivalo.de)